

**INTERNACIA  
PEDAGOGIA REVUO**

---

**IPR**

**Eldonata de Internacia Ligo  
de Esperanto-Instruistoj**

**ILEI**

---

Jarkolekto 5

N-ro 1, 1975

**Rotterdam**

Enhavo	Paĝo
Tazio Carlevaro: Kelkaj pripensoj koncernantaj la instruadon de Esperanto . . . . .	1
D-ro Deziderio Koncz: La problemoj de l' alproprigo de fremdaj lingvoj . . . . .	5
D-ro Kazimierz Wojciechowski: Kio estas andragogio? . . . . .	8
D-ro I.C. Thimann: Malŝparo de mono kaj persona inkubo? . . . . .	11
Canko Kolev: Aŭdo kaj muzikeco . . . . .	12
Skribarto (Jean Le Gal) . . . . .	14
J. Vincent: Pri la instruado de la gepatra lingvo . . . . .	16
Georg Christian Sack: Sperto en sonbenda lingvo-lernado . . . . .	16
Johano Ingusz: Mallonga trarigardo de la hungara publika instruada sistemo . . . . .	18
Raif Markarian: Edukado — faka raporto . . . . .	19
R. Bussé: 17-a Eŭropa Semajno en Hannut (Belgio) . . . . .	20
Raif Markarian: Prepare al plano por Eŭropa Edukado . . . . .	21
Kazimierz Gorzelok: Pedagogia enketo . . . . .	21
Scienca Esplor-Instituto de ILEI (SEI) . . . . .	22

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO (IPR)

Oficiala organo de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI)  
Aperas trifoje jare

Provizore redaktis: Helmut Sonnabend  
Im Eckerkampsfeld 11a  
D-3161 Dollbergen

Kontoj: 1.) ILEI-IPR  
25.28.71.464-40  
Bank Mees & Hope NV  
Rotterdam Coolsingel 93  
2.) Helmut Sonnabend - Sonderkonto  
Poŝtekkonto n-ro 3245 66-309  
Hannover

La abonprezon oni pagu al la landaj sekcioj de ILEI, escepte nemembroj de ILEI povas pagi al la supre indikitaj kontoj.

### IPR — Fonduso

Bonvolu helpi per via donaco al diversaj celoj de IPR-fonduso: finance helpi al IPR- ebligi abonojn en landoj havantaj valutajn problemojn- kreado de infanliteraturo- verkado de pedagogia literaturo.

Bankkonto: ILEI-IPR (fonduso), n-ro 25.28.71. 464-40, Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, Rotterdam.

## Kelkaj pripensoj koncernantaj la instruadon de Esperanto

Tazio Carlevaro, Novazzano (Represo de artikolo aperinta en MONATA CIRKULERO de KULTURA CENTRO ESPERANTISTA (KCE) Postiers 27 - La Chaux de Fonds - Svislando)

### Enkonduko

Plej bone pri pedagogiaj problemoj povas paroli pedagogoj kun vasta sperto en la instruado. Tamen, kaŭze de la socia graveco de la pedagogio, estu permesate ke ankaŭ ne-pedagogo (kvankam mi instruas Esperanton jam ekde du jaroj ĉe Migros kaj ekde same multe da tempo ankaŭ psikiatron kaj klinikan psikologion ĉe profesi-flegistinaj lernejoj mi certe ne konsideras min pedagogoj) esprimu kelkajn observojn kaj opiniojn pri temo, kiu tuŝas nin esperantistojn en sufiĉe tikla punkto: nome pri la instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj.

### Kial ĝuste pri ĉi tiu temo?

Unu el la mitoj de la Esperanto-movado estas la instruado de Esperanto en la lernejoj, nome ankaŭ al la infanoj. Lastatempaj spertoj sub la aŭspicioj de ILEI (Internacia Ligo de Esperanto-Institutoj) ŝajne evoluis pozitive, sed mi ne konas ilin. Do ne pri ili mi parolos. Sed tiu almenaŭ parte nova fenomeno, kiun evidentigas la agado de ILEI, ne restis senresponda en Svisio: grupo ĉirkaŭ la zurikaj instruistoj s-roj Vontobel kaj Matzinger, kun la helpo kaj apogo de SES, komencis eklabori en tiu direkto. La afero, principe, estas salutinda. Sed sciante, ke miaj konoj estas limigitaj, mi decidis ampleksigi miajn sciojn pri la problemoj de instruado de lingvo al infanoj. Tial, preskaŭ hazarde, mi renkontiĝis kun dika libro; iaspeca itallingva biblio pri frua lingvo-instruado, kiun aŭtoris prof. d-ro R. Titone, fama itala psikolingvisto kaj pedagogoj: *Bilinguismo precoce ed educazione bilingue* (Romo, 1972), kiu resumas preskaŭ ĉiujn spertojn ĝis nun faritajn en Eŭropo kaj parte ankaŭ ekster Eŭropo. El tiu libro mi ĉerpis kelkajn ideojn, kiuj estas signifaj ankaŭ por la juninfana Esperanto-instruo, kaj ilin mi deziras prezenti al la Esperanta publiko, kiu aparte interesiĝas pri tiu problemoj.

### Ĝeneralaj problemoj de infana bilingvismo

Unu el la plej tipaj aspektoj de la Esperanta movado estas la distrumpetado de la ekzisto de "denaskaj" esperantistoj (fakte: denaskaj kompetenculoj pri Esperanto kaj pri alia lingvo), sed ankaŭ la komplete manko de detalaj studoj pri la fakta signifikeco de tiu denaska esperantisteco. Laŭ W.F. Mackey ("The Description of Bilingualism", aperinta en *Canadian Journal of Linguistics*, VII, 1962, 2, p. 53) oni devus analizi minimume la jenajn faktojn:

- a) Nivelo de perfekteco en la dulingva komportamento;
- b) Funkcioj kaj alternadoj de la du lingvoj;
- c) Studoj pri la interferoj strukturaj (gramatikaj, sintaksaj, leksikaj/semantikaj/inter la du lingvoj), t.e. pri la psikolingvistikaj problemoj de la duobla kompetenco.

### Ĝeneralaj problemoj de frutempa lingvoinstruado

Antaŭ ol komenci eksperimenton, oni devus analizi la sukcesojn kaj malsukcesojn de la antaŭaj analogaj eksperimentoj. Tiu estas ĝenerala regulo, valida ne nur en pedagogio. Oni devus unue do ellabori (statistike) la kon-

dicojn kaj la rezultojn de la iamaj spertoj pri fruinfana lingvoinstruado de Esperanto al divers-landaj infanoj.

Sed tia analizo devas enhavi ankaŭ ĝeneralajn konkludojn starigitajn sur la bazo de la tezoj ellaboritaj komence de la eksperimento: t.e., se oni faras eksperimenton, oni volas ion pruvi, kaj oni organizas la eksperimenton tiel, ke oni povas ellabori ĝin statistike je ĝia finiĝo.

Verŝajne la plej grava demando, kiun oni renkontas, estas la jena: "Kial instrui fremdlingvon tiel frue? Kaj kial (en nia kazo) ĝuste Esperanton?" Eksperimento devas esti tiel konstruita, ke ĝi donu respondon konvinkivan al tiuj demandoj.

En la starigo de la ekzamenendaj faktoroj do estas konsiderendaj aparte faktoroj koncernantaj la lingvodidaktikon, la lingvistikon, la pedagogion, la psikologion kaj la neŭrofiziologion.

La fama neŭrofiziologo Penfield, en *Speech and Brain Mechanism* (1959), proponas la gravan koncepton de motivado en la lingvoinstruado, kiun li situigas ĉefe en la parola kreivemo kaj en la impulso al pli granda socialiĝo. Li cetere asertas, ke oni devas akurate analizi la efektojn de frutempa lingvoinstruado al la ĝenerala personeco de la infano, al ĝia inteligento-developo kaj al la sociaj valoroj: pri ili, cetere, la internacia literaturo ofte malkonkordas.

### Aliaj frutempaj lingvoinstruadoj

Laŭ mia opinio la esperantistoj devus akurate studi ankaŭ la ĝisnunajn eksperimentojn de frutempa lingvoinstruado, kiuj koncernas naciajn lingvojn. Ili ne estas sporadaj, kiel kelkaj el ni opinias. Titone, *cit.*, p. 143, asertas, ke laŭ UNESKO-statistiko (farita en 45 landoj en 1962) en 32 landoj ekzistis programoj por lingvoinstruado al infanoj sub la deka jaraĝo. Nur ses landoj tute ne havis programojn tiurilatajn. Oni tiam povis konstati 19 kursojn pri angla, 13 pri franca, 4 pri rusa, 3 pri germana, 2 pri hispana lingvoj.

### Teknikaj problemoj de frutempa lingvoinstruado

Ĉiuj cititaj aŭtoroj (Titone, *cit.*, p. 304-5) emfazas tri elementojn, kiuj ŝajnas esti esencaj en la frutempa lingvoinstruado:

a) *Faktoroj koncernantaj la instruistojn*: Laŭ Titone, la instruistoj devas bone koni la modernajn lingvistikajn teknikojn, esti bonaj spertuloj pri psikologio, kaj, ĉefe, perfekte scii la instruantan lingvon (p. 194). Ili devas esti ankaŭ bonegaj pedagogoj, ĉar dumlecione oni devas ofte "ŝanĝi registrojn". Titone citas tekston de Peter Doyé, *Frühbeginn des Englisch-unterrichts*, Cornelsen Verlag, Berlino, 1966, kiu postulas la jenajn kvalitojn ĉe tiaspecaj instruistoj:

- sperto en la instruado al infanoj;
- bonega kono aktiva kaj pasiva de la koncerna lingvo;
- kono aktiva kaj pasiva de la moderna didaktiko de la fremdlingva instruado;
- spertoj pri instruado de la koncerna lingvo al infanoj en la 5-a klaso;
- aktivi en la klaso kiel klas-instruistoj.

Laŭ Titone (*cit.*, p. 252) eksperimento nepre fiaskas se

- oni ĝin preparis malbone kaj maldetale;
- se la instruisto ne havas la postulatajn kvalifikojn;
- se la instrumentado estas netaŭga;
- se ĝi efektiviĝas sen iu ajn rilato kun la ceteraj instruataj fakoj.

Laŭ mi ĉi tiuj konsideroj de eminenta specialisto ŝatas problemigan lumon al la lastatempe aŭdita opinio far la zurikaj Vontobel-grupestroj, ke "la instruisto povas instrui Esperanton kunlernante ĝin kun siaj disĉiploj", kaj ke "iu ajn, kondiĉe ke li instruu Esperanton al infanoj ankaŭ eksterklaseje,

povas membriĝi al la lanĉita eksperimento". Laŭ mi ŝajnas vere, ke neniu specialisto povus konsenti kun tiaj esprimaĵoj.

b) *Faktoroj koncernantaj la "medion" de frutempa lingvoinstruado*: laŭ la supraj aludoj estas do klare, ke ne estas eble instrui al infanoj Esperanton sen ligi tiun instruadon kun la cetera lernejlaboro. Oni instruas Esperanton en lernejo, sed oni devas utiligi ĝin enlerneje (ankaŭ Penfield asertas ion tian). Gravas do instrui aliajn fakojn en la fremdlingvo.

c) *Grava problemoj estas la helprimedoj*: la esperantistoj okupiĝis pri ili nesufiĉe profunde. Gravas la aŭdo-vidaj rimedoj (kp. tiurilate usonan eksperimenton de Johnson, Flores kaj Ellison: "The Effects of Foreign Language Instruction on Basic Learning in Elementary Schools", aperinta en *Modern Language Journal*, 47, 1, 1963, p. 8-11), libroj, TV-programoj, lingvaj laboratorioj kun koncerne adaptitaj programoj, puprecitoj, filmoj, legaĵoj, ludoj. Titone detale priskribas tiujn helprimedojn, sed mi ne deziras sekvi lin, ĉar mi ne estas pedagogo.

### Celoj de la frutempa lingvoinstruado

El la diversaj atingoceloj de gravaj programoj ĝis nun ellaboritaj ni celas pri-skribi unu. Ĝi estas kanada, kaj nomiĝas Tan-Gau-metodo (Titone, *cit.*, p. 159):

- Unua ŝtupo: aŭdo-kompreno (diskoj, filmoj, instruisto, TV, kantoj);
- Dua ŝtupo: interparolo (kongruaj respondoj al demandoj);
- Tria ŝtupo: libera parol-esprimiĝo;
- Kvara ŝtupo: vido-kompreno (legado);
- Kvina ŝtupo: laŭtvoĉa legado (kompreno lega + prononco);
- Sesa ŝtupo: gramatiko, ortografio, aktiva skribado, ekzercoj.

Tiel oni procedis en angla eksperimento en Leeds (Titone, *cit.*, p. 191), kie, por atingi la cititajn celojn, oni uzis la jenajn rimedojn:

- parola "atako" de la lingvoinstruado;
- prezento de kompletaj segmentoj (frazoj aŭ signifaj propozicioj);
- uzo de aŭdvidaj rimedoj (filmoj, diapozitivaj, diskaj . . .);
- interesaj aktivaĵoj (ludoj, kantoj, dramigoj);
- uzo de la fremdlingvo en la instruado de historio, geografio, aritmetiko, poezio;
- klaslaborado pri kaj en la fremdlingvo (*ne parolante* tamen pri gramatiko).

Vi vidas do, ke la instruado al infanoj estas tre kompleksa afero, kiu postulas sciojn kaj longajn prelaborojn, ankaŭ se la celoj aspektas modes-taj. Oni neniel povas improviziĝi pedagogo pri frutempa lingvoinstruado.

### La problemoj de la pretigo de la helprimedoj

La kunmeto de la helprimedoj postulas ne nur la analizon de la lingvo instruota kaj ĝian kontrastivan ellaboron, sed ankaŭ specifajn analizojn de la infana lingvo. Titone citas kelkajn spertojn kaj kelkajn laborojn tiurilatajn.

El la formala vidpunkto, la specialistino Ruqaina Hasan (el la Universitato de Edinburgo) trovis, ke en 1000 frazoj troviĝas 778 verboj 50%-e el kiuj en indikativo prezenco). Ŝi povis ellabori ankaŭ bazan vortaron kaj ordigi ĝin laŭĉefaj infanaj interescentroj.

Ankaŭ la franca institucio CREDIF ellaboris analogajn rezultojn (1959). Ĝi analizis entute 34 interescentrojn, kaj segmentigis la trovitan materialon en la jena maniero:

- dum la 1-a lernoĵaro: 95 vortoj kaj 52 strukturoj;
  - dum la 2-a lernoĵaro: 63 vortoj kaj 50 strukturoj;
  - dum la 3-a lernoĵaro: 56 vortoj kaj 33 strukturoj.
- Entute: 214 vortoj kaj 135 strukturoj.

Tre interesa estas ankaŭ la studo de Peter Doyé (*cit.*), kiu povis segmenti la vortomaterialon laŭ la jenaj interescentroj: ludiloj, lernejo kaj instruo, familio kaj domo, korpomaterialoj, vestaĵoj, ĉetabla, surstrate, bestoj, aktivitoj dum la tago (Titone, *cit.*, p. 225).

### Kiel testi la lernadon

Por enstatistiki la rezultmaterialon kaj poste tiri konkludojn oni devas havi la eblon eltiri parametrojn. Kaj do havi testojn, por senekvivoke eltiri ilin. Eksperimento, kiu ne respondas al ĉi tiuj postuloj, havas neniun sciencon valoron. Do jen estiĝas la problemo de lingvotestado ĉe infanoj.

Tre interesa estas la sistemo (pure empiria) ellaborita far Doyé (*cit.*). Jen ĝi, en tre resuma maniero:

#### a) *Testado de la kursoj mem:*

Socia situacio de la klasejo (socia medio de la lernantoj, sekso, aĝo). Selektado de la temoj traktitaj per vortoj kaj strukturoj: ĝenerala prijuĝo. Ĝenerala prijuĝo pri la didaktika materialo ellaborita.

Prijuĝo de la didaktikaj metodoj uzitaj.

Resumaj rezultoj kaj prijuĝoj.

#### b) *Testado de la rezultoj:*

b-1) *Vortaro:* Oni prezentas bildojn, kiujn la lernanto devas nomi (evidente nur el la programita stoko!).

b-2) *Prononco:* Oni ripetu 4 frazojn, ĉiu el ili havas 2 malfacilajn sonojn (N.B.: problemo de kontrastiva fonologio!).

b-3) *Kompreno:* Oni respondu al 4 demandoj:

plej bona: signifohava respondo senerara; poste: kongrua respondo kun ne pli ol 2 eraroj gramatikaj kaj/aŭ prononcaj; laste: respondoj kun 2 aŭ pli multe da eraroj.

b-4) *Libera parola produktado:* Oni devas pridiskuti sceneton. Evidente la pritakso ĉi tie estas plej malfacila. Oni konsideris la jenajn parametrojn: Vortaro, gramatika strukturo, prononco, flueco de la parola esprimiĝo.

### Konkludoj

Pluraj esperantistoj ne konscias pri la problemaro, kiun prezentas al la specialistoj (pedagogoj, psikologoj, lingvistoj) la frutempa lingvoinstruado. Pro tio estas facile troveblaj en niaj medioj "simplismaj" opinioj. Bedaŭrinde estas precize tiu simplismo, tiu amatoreco, kiu riskas fiaskigi Esperanton en la lernejoj: sed eble, post ĉi tiu artikolo, kelkaj interesataj homoj komencos interesiĝi pri la hodiaŭa disponebla bibliografio pri didaktiko kaj psikolingvistiko de frutempa lingvoinstruado, cel eviti la faritajn erarojn kaj cel apliki jam certajn rezultojn kaj metodologiojn de instruo, de taksado kaj de materialpretigo al la frutempa instruado de Esperanto.

Tazio Carlevaro

Tiuj, kiuj deziras pliajn informojn, skribu al:

KCE - Postiers 27

CH 2300 LA CHAUX-DE-FONDS

Svislando.

## La problemoj de l'alproprigo de fremdaj lingvoj

### La problemoj de l'alproprigo de fremdaj lingvoj

Viglan intereson vekis en la pedagoga fako – precipe inter la lingvoinstruistoj – tiu polemiko, kiu daŭris en la proksima pasinto en la kolumnoj de la hungara gazeto "Népszabadság" (Popolibereco) sub la titolo: "Ĉu iu ajn povas alproprigi fremdan lingvon?" Unu el la partoprenintoj, nome la konata, hungara lingvisto, la elstara scienculo d-ro Geza Barci (Géza Bárczi), universitata profesoro, Koŝut-premiita akademisto estis petante alvokita por diri opinion pri tiu ĉi problemoj.

La profesoro estas malnova esperantisto, kiu atente sekvas la okazaĵojn, tre volonte diskutas kaj direktas, sed persone ne partoprenas la movadon. Li estas aŭtoritata lingvisto (prezidanto de Lingvistika Sekcio de Hungara Sciencakademio), kiun streĉite atentis ne nur la diletantaj adeptoj, sed ankaŭ la scienca mondo.

Lia unua granda, publika polemiko temis pri la internacia lingvo en la kolumnoj de la gazeto "Magyar Nemzet" (Hungara Nacio) en 1966 sub titolo: "Ĉu Esperanto povas fariĝi mondlingvo?" Tiu ĉi polemiko alportis grandan sukceson al la internacia helplingva movado. Ĝi pruvis science, ke Esperanto vere povas esti mondlingvo.

La nuna problemoj pri la alproprigo de iu fremda lingvo same povas kalkuli je granda interesiĝo.

La 23-a numero de la hungara pedagogia revuo "Köznevelés" (Publika Edukado), kiu aperis la 9-an de decembro 1966 en Budapeŝto okupiĝas detale pri la problemoj sub titolo: "La forumo de "Köznevelés" (Publika Edukado). Unu el la kunlaborantoj de la menciita revuo vizitis kaj intervjuis d-ron Barci, kiu respondis la demandojn:

"En la gazeto "Népszabadság" mi jam skribis: scio de fremdaj lingvoj estas profita, en pluraj profesioj eĉ neforlaseble necesa. Kiu ajn kiel intertraktanto devas rilati kun eksterlandanoj, kaj kies profesio estas la perado de kulturoj de aliaj nacioj, kiu bezonas konstante la spertojn, esplorajn rezultojn de alinaciaj fakuloj, en sia ĉiutaga laboro, en evoluigo de sia fakono, tiu ne povas malhavi la diversgradan kaj intensan konon de iu, eĉ laŭkute pluraj, fremdaj lingvoj; kvankam tiu ĉi tasko, se nur por li ne estas fako iamaniere la fremdaj lingvoj kaj literaturo, forrabas de lia kreanta kaj produktanta laboro tre multe da tempo kaj energio. Sed ankaŭ sendube, la kono de fremdaj lingvoj estas ankaŭ por tiuj utila, kiujn siaj profesioj ne devigas lerni lingvon. La turistoj moviĝas pli facile en tiuj landoj, kies lingvon li konas, kvankam kompreneble lia lingvoscio ne helpas al li en aliaj landoj. Sed ĝenerale, per la lingvokono la spirita horizonto de la homo vastiĝas, li konatiĝas, helpe de la fremda lingvokonstruo, kun aliaj formoj de la pensado kaj se li atingis la delikatan, nuancan komprenon de la fremda lingvo, la homa kulturo, la delikataj, nuancaj, interesaj, variaj terenoj de la fremda lingvo malfermiĝas al li . . .

Estas interesa ankaŭ la demando: kian rolon havas la lingvosento en la lingvostudado. Ĉu ekzistas propre "lingvistika sento", aŭ ĝi estas nur "miskredo", "malplena nocio", kiel ni povis legi en la interesa artikolo de d-ro Jozefo Hegedis (Hegedüs), aperinta en la kadro de la supremenciita polemiko.

Laŭ la opinio de Barci: la lingvosento ekzistas. Kvankam estus longa la faka analizo de tio, el kio konsistas la lingvosento. La artikolo pruve citas tion, ke propran gepatran lingvon ĉiuj povas ellerni. Estas vero, kvankam ankaŭ tio veras, ke ne ĉiuj egale facile kaj certe. Sed efektive, ankaŭ ne pri tio temas,

sed pri tio, ke en la homoj je tre diversaj gradoj aperas tiu elasteco, per kies helpo ili povas transiri de la voĉfaradoj kutimaj en siaj gepatraj lingvoj, al tute alia artikigado, sed ĉefe per tio sendependigante sin de la kutimaj vort- kaj frazfaradoj; nome la pensoformoj povas alĝustigi al aliaj konstrumetodoj. Ne tio estas la vera malfacilaĵo, ke oni devas anstataŭ viro diri "Mann" aŭ "homme" — kvankam fremdajn vortojn encerbigi ankaŭ ne estas por ĉiuj egale facila laboro —, sed oni kutimas diri, ke pensi en la fremda lingvo oni povas en malperfekta grado. Tiu ĉi aserto, ke lingvosento ne ekzistas, signifus, ke ĉiuj homoj egale facile alproprigas kiun ajn fremdan lingovon. Ni scias bone, ke al tio ĉi la ĉiutaga sperto kontraŭdiras, la altega procento de la forfalantoj de la plej diversaj lingvokursoj. Kontraŭdiras tiu fakto, ke iu homo preskaŭ dum kelkaj monatoj ellernas ian lingvon, dum iu alia jardekojn povas vivi en fremda lingvokampo — kaj tio estas konata, kiel la plej bona metodo de la lingvostudado — tamen nur tre mankohave alproprigas la lingvon de la medio. Se ne ekzistas lingvosento, tio signifus, ke la mensaj kapabloj de ĉiuj homoj egalas en ĉiuj kampoj, kiu ajn povos esti ĉu Mezzofanti, aŭ Einstein, ĉar, mi kredas, ke neniu kontestas: la lingvostudada-kapablo estas spirita dispozicio. (Tio ne signifas, ke tiu, kiu studadas lingvojn facile kaj rapide, tiu estas neeviteble pli inteligenta ol tiu, por kiu tio ĉi estas malfacila tasko, eĉ nek la kontraŭon.) La homaj kapabloj estas tre variaj kaj ĉi tiuj kapabloj en la identa homo ekzistas ne egalegrade. Genia kemiisto eventuale malfacile luktadas kun iu fremda lingvo, la inteligenteco de la 5-6 lingvojn parolanta homo eble ne superstaras la meznivelon, eĉ povas esti kelkfoje sube. Estas superflue multoblige la ekzemplojn: publike konatas tiu afero, ke unu homo por ĉi tio havas pli grandan talenton, la alia por tio. Kaj la en lingvosentan diferencon povas transporti nenia laŭmoda metodo (sur tiu ĉi kampo cetere la metodo tre dense ŝanĝiĝas, kaj ne senkaŭze.)

Post tio ĉi tamen oni povus demandi: ĉu povas alproprigi kiu ajn kian ajn fremdan lingvon? Estas eble, ke inter favoraj cirkonstancoj jes. Sed la problemo estas: ĉu la atendebla avantaĝo proporcias kun la dediĉitaj tempo kaj energio. La alproprigo de iu, tiel nomata "mondlingvo", postulas ankaŭ de la meza lingvosenta kaj mezkultura homo seriozan fortostreĉon, persiston kaj dum jaroj multege da tempo absorbas. Kiom ajn estus dezirinde, ke ĉiu homo konu, krom sia gepatra lingvo tian fremdan lingvon, kiu malfermas pordegon por li al la ĝenerala homa kulturo, ekzistanta ekster la hungara lingvokampo, tio ne povos esti esperebla, ke ĝeneraliĝos iu el inter la franca, germana, angla aŭ rusa lingvoj en la plej larĝa socia tavolo. Ĉi tia revado, estu kia ajn nobla kaj bela, estas tamen nur iluzio.

Ĉu do ekzistas maniero, ke ĉiu povu praktike trarompi la muron de la lingva izoliteco relative per bagatela penado kaj tempofero? Jes, ekzistas ĉi tia maniero. Tiu ĉi estas Esperanto. Ĉi tiu lingvo estas facile alproprigebla sen ĉiuj fremdaj lingvokonoj kaj gramatikaj kvalifikitecoj per sia eksterordinare simpla senescepta, logika konstruo, genia vortfara sistemo. Esperanto estas vere por ĉiuj alirebla, kaj se ĝia praktike valorgrada ellernado ankaŭ postulas iom da laboro kaj tempo, tio ĉi estas senkompareble pli malmulta ol tio, kion alia lingvo postulas. Ĝia gramatika sistemo estas enmemorigebla dum kelkaj horoj (kompreneble ankaŭ estas sennecese por ellerni, kiel gramatikan sistemon), kaj dum kelkaj monatoj la lernanto atingas jam la praktike valoran konon de unu lingvo.

Kion oni povas atendi de la disvastiĝo de Esperanto, kiel internacia help-lingvo? Estas superflue pruvadi, kion signifus por la homaro, kiom da tempo kaj penado ŝparus la turisto, la komercisto, la partoprenanto de la internaciaj konferencoj, la scienculo, se ili ne devus penadi kun la studado de malfacilaj lingvoj. Sed ja — povus diri iu — ne estas eble deziri de la homoj, de la larĝaj tavoloj de la laborista socio oferon por iu eventuale nur malfrua estonto. La homoj bezonas la konon de tiu lingvo, kiu jam nun alportas definitajn avantaĝojn, vere trarompas la barilon de la lingva izoliteco kaj ebligas la interrilaton

kun la fremdaj kulturoj. Nu, Esperanto, kvankam la ĝis nun multe da sukceso kunportita batalo estas ankoraŭ proksimume ne finita, jam abunde prezentas tiujn avantaĝojn, kiujn povas doni la kono de ia dua lingvo. Esperantistoj ekzistas preskaŭ ĉie en la tuta mondo, kaj la esperantista mondorganizo havas reprezentantojn en ĉiu pli malgranda aŭ granda urbo, kiuj staras je la dispono de la eksterlandaj esperantistoj. Kiu deziras informadon pri la historiaj art-objektoj, naturaj, ekonomiaj, komercaj ktp. cirkonstancoj, tiu per ĉi tiu organizo ĉion povas facile, rapide, fidinde ricevi. Estas interpretisto, gvidisto kaj konsilanto je la dispono de la turisto. Korespondantan interrilaton facilmaniere oni povas formi kun la kvin kontinentoj, kaj ĉi tiuj korespondadoj povas peradi ne nur valorajn konojn, sed per la pli bonaj rekono kaj interkompreno de unu la alia servas ankaŭ la plej noblan klopodon de la homaro: la elkonstruadon kaj defendadon de la paco. Pri la ĉiam pli kreskanta riĉeco, altnivela valoro de Esperanto-literaturo estas preskaŭ superflue aparte menciiti. Por la fakulo — scienculo, teknikisto, kuracisto, ktp. — same multe da helpo alportas Esperanto, ĉar ĝi peras personajn interrilatojn kun la multnombraj, eksterlandaj esperantistaj fakuloj. Pluraj aŭtoritataj sciencaj revuoj komunikadas Esperanto-resumojn, sed ĉiam pli multe evoluas ankaŭ la originala Esperanta fakliteraturo. Estas vere, ke sur tiu ĉi kampo, ĉefe estonte ni multe atendas, sed estas same tre valora tio, kion Esperanto ankaŭ jam nun povas prezenti. Multnombraj mondfirmoj transiras en ĉiam pli granda mezuro al la korespondado de Esperanto kaj ili aktivigas je tio ankaŭ siajn klientojn. Ankaŭ la oficialaj rondoj ĉiam pli bone trasentas la gravecon de tiu ĉi movado. En nia Patrio, en Hungario, ekzemple, en Universitato, en la filologia fakultato, oni povas akiri profesoran diplomon de Esperanto, kaj eble ne estas malproksime tiu tempo, kiam la sciencnivela instruado de Esperanto ricevas sian lokon ankaŭ en aliaj ĉeflernejoj. Estas ne diskuteble, ke ĝis la fina triumfo necesas ankoraŭ longa batalo. Sed ankaŭ tiu estas certe, ke fariĝi simpla soldato de tiu ĉi batalo estas ankaŭ en si mem nobla tasko, aliparte la alproprigo de tiu ĉi lingvo estas jam ne ofero, sed facile sindonanta valora profito.

Kian helpon povas doni Esperanto al la studado de aliaj fremdaj lingvoj? Estas konate, ke ĝenerale la ellernado de la unua fremda lingvo estas malfacila tasko, tiu de la ceteraj jam multe pli alireble per la kreskanta elasteco de la lingvokapablo. Esperanto, kiu reduktas la komencajn malfacilaĵojn je la minimumo, estas eminenta inico ankaŭ al ceteraj lingvoj. Tion atestas nombraj interesaj, eĉ sukcesaj eksperimentoj kaj eksterlande kaj en nia Patrio. Tiuj lernantoj ekzemple, kiuj neniel povis sukcesi en la rusa lingvo, kvankam eminenta profesoro gvidis ilin, post kelkmonata lernado de Esperanto en la rusa montris saltoidan progreson. Estas sama sperto rilate ankaŭ al aliaj fremdaj lingvoj. Do, se ni opinias dezirinde el pluraj kaŭzoj, ke ĉiu homo posedu iun duan lingvon krom la gepatra lingvo, kiu ebligas la interrilaton kun la eksterlando, la pli profundan ekkonon de homoj kaj spiritaj produktaĵoj, tiu ĉi lingvo povas esti por pli larĝaj tavoloj de la socio, sed por ĉiuj nur Esperanto.

Tradukis kaj kompilis:

d-ro Deziderio Koncz

# Kio estas andragogio ?

de prof. d-ro Kazimierz Wojciechowski.

Andragogio estas kleriga pedagogia teorio pri plenaĝuloj. Komence andragogio enestis en pedagogio, havante en ĝi nemultajn menciojn, ĉefe la pri-skribajn. Laŭ la evoluo de la klerigo kreskas nombro de ĝiaj problemoj kaj rimarkoj ligitaj kun bezonaro de plenaĝuloj. En la vorto **p e d a g o g i o** (greka: pais, gen. pajdos-knabo kaj ágo-mi kondukas) estas akcentata la edukado de infanoj, dum la plenaĝula klerigado ampleksas pli kaj pli de junularo laboranta kaj de plenaĝularo. Andragogio ampleksas ne nur la problemojn de instruado, sed ankaŭ de lernado, de memlernado kaj de memedukado.

Por andragogio argumentas:

1. amaso de plenaĝaj lernantoj, superigantaj en tiaj landoj kiel Sovetunio kaj Usono la nombron de lerneja junularo. La nombro konstante kreskas pro pliampleksiĝo de klerigo je tuta homa vivo;

2. granda kaj ĉiam kreskanta nombro de klerigaj institucioj;

3. kreskanta nombro de laborantoj, kiuj devas lerni, kreskanta nombro de klerigantoj (instruistoj, lekciistoj, edukistoj). La impona evoluiĝo kaŭzas bezonon de scienca pripensado, des pli ke la sciencobranĉo, gvidita longe far la volontuloj, ne specialistoj, inklinita al laboro aktiva, sed ne ĉiam racia kaj efika.

Trakti andragogion aparta sciencobranĉo emas M. Siemieński (polo), M.S. Knowles (usonano) k.a. Relative memstara opinias ĝin B. Samolevčev (jugoslavo) kaj F. Urbańczyk (polo) kun kelkaj aliaj.

LA ESPLOROBJEKTO de andragogio estas ne nur la rilatoj, kiaj estas inter klerigantoj kaj klerigatoj, sed ankaŭ celoj, politiko, planado, instruado, sistemo, taŭgeco, lerteco, komparo kun aliaj sistemoj de plenaĝula klerigado en aliaj landoj.

Andragogio eksplikas la socian rolon de klerigado, kaŭzojn de ĝia evoluo, bezonojn kaj eblojn de kleriĝo (kune kun psikologio); ĝi esploras taskojn kaj edukajn metodojn — mensojn, socimoralajn, politikajn, higienajn, estetikajn, fakajn, fizikajn; organizadon de la klerigado; klasifikon de ĝiaj institucioj kaj iliajn celojn kun strukturo.

Andragogio interesiĝas ankaŭ pri edukado por labori, pri lernejoj kaj kursoj por plenaĝuloj, pri eduka rolo de turismo kaj sporto, pri problemaro de ripozado, pri popularigado de scienco, pri legado kaj pri memlernado.

LA CELOJ de la plenaĝula klerigado estas: — prepari por kritika akcepto de akiraĵoj de estintaj generacioj, — krei kulturon de sociiĝo, kunrespondeco, frateco kaj reciproka helpo. Necese estas ankaŭ helpadi en kleriĝado de plenaĝuloj kaj en konstanta perfektigado. La celojn difinas antaŭ ĉio la politiko, sed andragogio analizas ilin, argumentas, indikas la praktikan aplikadon, kaj nur malofte elŝovas ilin aŭtonome, uzante proprajn esplorojn kun helpo de aliaj sciencobranĉoj. La celoj de plenaĝula klerigado koncentriĝas ĉirkaŭ formado de mensoj kaj karakteroj ne nur koncerne al sociiĝo, respondeco, memregado, bonaj moroj, estimo por leĝo, fiziklerteco, sed ankaŭ en la laborkulturo. Oni strebas al universala instruiteco je almenaŭ meza nivelo, al alta kulturo de la loĝantaro. Kaj fine en la monda skalo ekzistas problemoj konservi la pacon, kiu estiĝis la ĉefa celo de plenaĝula edukado dum la nuntempo.

Kompreno kaj akcepto de la celoj postulas kontinuadon de la ĝenerala klerigo dum tuta vivo. Tiu klerigo devus doni ekzaktan edukon patriotisman kaj internacian. Kunigante la zorgojn pri faka lerteco, pri ĝenerala klerigo kaj pri kultura ripozado, la plenaĝula klerigado ebligas enprofundi la sciencon mondkoncepton kaj liberigi la homojn de superstiĉoj.

En la tuta civilizita mondo andragogio postulas likvidi analfabetismon, per kiu estas malfeliĉigata preskaŭ duono de homaro. Tuj post la jaro 1945-a parto de andragogoj strebis eduki civitanojn por la komuneco de nacioj. Nuntempe oni pli akcentas postulon de la edukado en socia respondeco, substrekte la solidarecan sintenon. Andragogio agnoskas teknikan progreson. Ĝi zorgas ankaŭ pri integriĝo en kadro de la nacio kaj inter nacioj.

KLASIFIKO de la plenaĝula klerigo estas tre malfacila pro abundeco de institucioj, de metodoj kaj de formoj. La koncernajn instituciojn oni dividas inter la lernejoj (lernejoj, kursoj) kaj ripozecaj (klerigejoj, klubejoj, kulturdomoj ktp.).

Prikonsiderante la esencon ni povas diferencigi: fak-, politik- kaj ĝeneral-klerigon. El vidpunkto de lernodevo ni apartigas la ĝ u s t a n funkcion de plenaĝula klerigado kaj la a n s t a t a ŭ a n (nivelo de elementa lernado lerneje kaj kurse). Formojn de la kleriglaboro oni dividas inter i n t e n s i v a j (malgrandaj, sed aktivaj grupoj) kaj a m p l e k s i v a j (koncernantaj grandan nombron de homoj).

Józef Chałasiński en la libro “La sociologia fono de kleriga laboro” menciis 8 funkciojn de plenaĝula klerigado: popularigan, integran, apartigan, adaptan, ekonomian, politikan, konservativan kaj konstruivan. Laŭ Tadeusz Nowicki ekzistas jenaj funkcioj de plenaĝula klerigo: egeliga, adapta kaj renoviga (la perfektiganta ĝisnunajn kvalifikojn).

PARTOJN de andragogio oni mencias jenajn:

1. Eduka teorio por plenaĝuloj, traktanta aferojn de la edukado soci-morala, higiena, estetika. En la parto komencas apartiĝi:

- andragogio de laboro a) industria; b) agrikultura;
  - andragogio de ripozado;
  - gerontologio, okupiĝanta pri kulturklerigaj bezonoj de maljunaj homoj.
2. Didaktiko de plenaĝuloj, en kiu estas diferencigataj 9 sekvaj sistemoj:
- klasleciono, — klerigkorespondo, kleriĝado per tn. viva vorto,
  - kleriĝrondoj, — memlernado per a) filmoj, b) muzeoj, c) turismo.

En la didaktiko oni diferencigas teorion de legado, popularigo, kaj memlernado.

3. Historio de la praktiko kaj teorio plenaĝulkleriga.

EN LA ESPLOROJ andragogio profitas helpon de:

- psikologio evolua,
- psikologio eduka,
- kultura sociologio,
- filozofio,
- etiko,
- ekonomio politika,
- higieno,
- demografio kaj
- historio.

Al urĝaj esplortaskoj de andragogio apartenas: problemoj de la eduko de laboranta junularo kaj de plenaĝuloj; antaŭ ĉio la eduko sociiga kaj porlabora (i.a. la laborejo kiel edukmedio, eduko por inventado kaj raciigo ktp.); la eduko civitana kaj mastruma kun maredukado; eduko por kultura ripozado; teorio de kursoj; teorio de lernolibro por plenaĝuloj; metodiko instrui plenaĝulojn; metodiko klerigadi kaj edukadi en popolaj universitatoj.

ESPLORMETODOJN andragogio aplikas samajn kiel pedagogio, apogiĝante je la dialektika materialismo. En la esploroj ĝi tamen konsideras diferencon de plenaĝuloj, do tion, ke ili profesie laboras, mem gvidas sian evoluon, havas pli grandan praktikon, estas pli kritikemaj rilate al si mem kaj siaj spertoj. La andragogiajn esplorojn gvidas altlernejoj kaj apartaj institutoj por plenaĝula klerigado, kiuj ekzistas en multaj landoj kaj urboj, ekz. en Leningrado, Prago, Lajpcigo, Londono k.a. Andragogia Instituto ekzistis en Varsovio

ĝis 1939-a kaj nun ĝi apartenas al Varsovia Universitato. Krom la libroj ĉi-problemaj aperas preskaŭ en ĉiu lando apartaj revuoj (en Pollando ĝi estas "Oświata Dorosłych"\*).

Andragogia problemaro aperis jam komence de la evoluo de pedagogio (en kadro de filozofio), do jam ĉe Platono kaj Aristotelo. El inter polaj sciencistoj tuŝis ĝin Szymon Marycki (1516-1574) – la profesoro de Krakova (Jagiellona) Universitato – en la verko "Pri lernejoj aŭ akademioj libroj ambaŭ" (1551). La andragogia pensaro de Marycki estis tre kuraĝa kaj eĉ pli progressa ol ĉe Jan Amos Komenský (1592-1670), esprimita en "Granda Didaktiko" (1657). Nur en la postaj verkoj Komenský opiniis pri la lernado dum tuta vivo. La andragogian koncepton skizis ankaŭ la utopiaj socialistoj – Tomaso Morus (1478-1535), Tomaso Campanella (1568-1639) kaj Roberto Owen (1771-1858).

Andragogiaj pensoj pli intensiĝas, kiam la klerigo de plenaĝuloj estiĝis la fakto socie ampleksa, de post la XVIII jarcento. Memorinda ĉi-rilate estas J.A.M. Condorcet (1743-1794), la granda franco, kiu en la "Projekto de organizo de publika edukado" (1792) skizis sistemon de plenaĝula klerigado kune kun la motivado.

En Pollando la aferojn de plenaĝula edukado tuŝis pensuloj de la XVIII jarcento, kiuj en kadro de la Komisiono por Nacia Edukado postulis la pedagogian instruon por gepatroj. Pli frue ol ie ajn projektis kaj realigis la ideon de kulturdomo Paweł Brzostowski (1739-1827), kiu jam ekde 1767 instruis kamparanojn en Mereĉ (Litovujo) legi, geografion kaj historion.

Science okupiĝis pri la problemoj Ludwik Krzywicki (1859-1941) komence en artikoloj kaj poste en la disertacio "Pri sistemo de instruiteco kaj pri la instruiteco ĝenerala", aperigita en la "Konsillibro por memlernantoj" (parto IV) en Varsovio, 1902 j. Ekde la tempo plimultiĝas nombro de andragogiaj pri-laboroj.

Elpoligis mag. Tyburcjusz Tyblewski

#### BIBLIOGRAFIO:

K. Wojciechowski: La bibliografio de plenaĝula klerigo. Varsovio 1962. (Bibliografia oświaty dorosłych).

P. Urbańczyk: Didaktiko por plenaĝuloj. Vroclavo 1965. (Dydaktyka dorosłych).

A. Kamiński: La libera tempo kaj ĝia problemaro soci-eduka. Vroclavo 1965. (Czas wolny i jego problematyka społeczno-wychowawcza).

K. Wojciechowski: Edukado de plenaĝuloj, la problemoj de andragogio. Vroclavo 1966. (Wychowanie dorosłych, zagednienia andragogiki).

\*) En la monata revuo "Oświata Dorosłych" (La Klerigo de Plenaĝuloj) jam kelkfoje aperis artikoloj pri esperantismo, i.a.: "Esperanto helpas formi la internaciecan mondkoncepton" kaj pri someraj E-universitatoj.

## Malŝparo de mono kaj persona inkubo?

de d-ro I.C. Thimann, supera instruisto por lingvoj,  
Nottinghama Gimnazio, Anglujo.

La Nottinghama Gimnazio estas solide kompetanta akademia institucio. Antaŭ 1966, kiam ni instalas la 15 unuajn budojn de nia lingvo-laborejo, – nun pliiĝitaj ĝis 30 – preskaŭ ĉiuj niaj 0\*-nivela kandidatoj en la franca kaj germana sukcesis; estis same ĉe A-nivelo, kie estis ĉiam bona proporcio da A-gradoj. Dum la plimulto da jaroj ni gajnadis du aŭ tri "Publikajn" premiojn. Per ordinaraj klasmetodoj kaj konstantaj interŝanĝoj kun Francaj, Belgaj aŭ Germanaj lernantoj ni atingis supermezajn buŝajn rezultojn.

Ŝajnis, do, ke oni povos gajni malmulton per la instalado de lingva-laborejo, kun la rezulta enkonduko de supraĵaj aŭd-lingvaj kursoj, kiuj malpliigas tiun bonegecon en la skribita lingvo, kiu garantias materian rekompenson. Ni jam estis humiligataj pro du jaroj de aŭd-vida laboro de eksperimenta grupo kiu, en la mez-lernejo, estis malfacile integrebla en grupojn kun aliaj knaboj edukitaj laŭ tradiciaj metodoj. Estis neeble izoli la grupon tute tra la lernejo; pro ilia relativa neprogresado en formala gramatiko kaj skribaĵoj, kiel ankaŭ ilia iom turist-simila vortprovizo, oni nur miksis oleon kun akvo.

Pasis tri jaroj de post la inaŭguro de la laborejo, tamen estas ankoraŭ malfacile kalkuli ĝian valoron. La mondo de la moderna lingvo ankoraŭ atendas unu el tiuj tedarj ekspertizoj per kio, supozeble, du grupoj kun identaj inteligentoj, kiuj havas instruistojn de ekzakte egala merito, kiuj pasigas ekzakte la egalan tempon, ampleksas definitivan asignon da studado, unu grupo en la klasĉambro, la alia en klasĉambro kaj/aŭ laborejo, kaj tiam submetitaj al la sama ekzameno, kiu estos poentita en identa maniero per la samaj ekzamenistoj.

En Usono la lastatempa Keating-raporto sugestis, ke lernantoj, kiujn oni instruas en la laborejo, estis konsideringe malpli kompetentaj ol siaj pli ortodoksaj similuloj, je la fino de la sama kurso; sed ni ne scias ĉu eksteraj kondiĉoj, disciplino, stimulo, instru-sagaco, ktp. estis identaj. Kiam, do, oni demandas al mi: "Kian bonon (aŭ efektivan malutilon) la laborejo faris al vi?", mi nur povas doni provan kaj treege personan ekspertizon.

Ĉi tiu ekspertizo estas je du niveloj, loka kaj nacia. Interne de la lernejo, mi dirus ke ni asimilis la laboron de la lingvo-laborejo en la kutiman programon sen malutilaj, kaj, fakte, kun utilaj rezultoj. Je la nacia nivelo, tamen, mi pesimismas. Sen formale aliĝi al la malprogresan movadon, mi dirus ke ni malŝparas multe de la peno en nia instruado; ni neniam atingos buŝan bonegecon en grandaj klasoj sub la ombro de skrib-ekzamenoj. Plue, tia buŝa lerteco, kian ni ja atingas, estas grandparte disĵetita per la trofrua ĉesigo de la lingvo-instruo.

Mi volus emfazi, ke tiaj modestaj gajnoj, kiajn ni jam atingis, dependas de tute idealaj kondiĉoj: admirinda maŝinaro, prizorgita de ekstere, kaj kontrolita de interne de pluraj treege kompetentaj instruistoj; kanboj kun mem-disciplino kaj forta stimulo. Ni havas tute surbendigitajn kursojn por la unua kaj dua jaroj de la franca kaj la germana, kaj baldaŭ akiras la trian jaron de la franca kurso, kune kun surbendigitaj kursoj en hispana kaj rusa por komencantoj en la sesa jaro; estis sufiĉe da tempo kaj inĝeniero por la produktado de multnombraj sonbendoj je pli altaj niveloj, kaj por la planado de originalaj lecionoj por plibonigi legadon kaj tradukadon.

Se ĉi tiuj favoraj kondiĉoj ne ekzistas, tiam la lingvo-laborejo devas prezenti malŝparon de tempo kaj personan inkubon, aŭ ambaŭ. "Al ĉiu, kiu havas,"

\* En britaj gimnazioj okazas 0-nivela ekzameno post 5 jaroj kaj A-nivelo post 7 jaroj de duagrada edukado.

informas la Biblio, "estos donite"; kaj se kondiĉoj jam estas bonaj, la maŝino plibonigos ilin.

Por reveni al niaj atingoj. Parol-maniero (de kaj lernanto kaj instruisto) rimarkinde pliboniĝas: kvankam, post kuraĝiga leciono je vendredo, daŭras ankoraŭ la lundomatena klasĉambra elparolo, kruda giganto, kontraŭ kiu oni devas batali tute denove. Nek estas multe da atestaĵo, ke bona parolmaniero akirita dum fruaj jaroj daŭros ĝis 0-nivelo se oni permesos al ĝi malboniĝi.

La respondoj de la knaboj al demandoj montras, ke oni nun opinias, ke lingvo-lecionoj estas nun multe pli ĝueblaj. Ĉi tiu, eble, estas la plej grava gajno. Oni nun ofertas al ili multbezonan diversecon, mekanikan plezuron, pli grandan aktivecon kaj personan kontentigon — vidu la serafajn aspektojn de pli junaj knaboj dum reaŭdigaj sesioj; kvankam novajeco, speciale inter la pli spertaj, rapide povas cedi al enuigado kaj cinikeco; la knaboj ankaŭ malŝategis rapide movantajn bendojn kiuj konfuzas, kaj bendojn kiuj surhavas tre longajn ekzercojn.

La laboro en la laborejo iukvante superfluas en ordinarajn lecionojn; pli granda gramatika facileco, kaj eble tenado de vortprovizo — kvankam ĉi tiu ankoraŭ restas kiel neesplorita teritorio. Demand- kaj -respond-bendoj por la 0-nivela buŝa ekzameno provizas utilan materialon por "gviditaj" verkaĵoj.

Kelkfoje kolegoj esprimas dubojn; ekzemple, 30 en laborejo estas troe. Certe, ĉe la konzolo, mi sentas min kvazaŭ en ia vastega fabrikejo. Certe, multe da malbona prononco okazas, pri kiu mi ne povas tuj komenti, kaj kiun miaj lernantoj ne povas aŭ ne volas korekti. Plue, se la tempo estas limigita, kiel dum la trijara germana kurso je 0-nivelo, aŭ kun la franca en la mez-lernejo, nun malpliigita ĝis kvar periodoj semajne, ordinaraj lecionoj suferos pro premado.

La laborejo donas al ni modernan koncepton. Antaŭ tri jaroj oni brue malŝarĝis la ekipaĵon dum stab-kunveno. "Kio ajn estas tio?" iu ekkriis. "La lingvo-laborejo", mi respondis, kaj estis ridegoj kiuj daŭris dum pluraj minutoj. Oni nun estas akceptinta ĝin, kaj ĝi donas al ni pseŭdo-sciencan prestiĝon, kaj bonvenan liberigon de malgajeco.

Baze, nia laborejo estas ĝuebla luksaĵo. Ni povus reiri, sen teruraj rezultoj, al antaŭaj kutimoj; kvankam ni farus tion kun iom da bedaŭro.

Traduko de Jack Heath de artikolo kiu aperis en Times Educational Supplement, Londono, la 14-an de nov. 1969. Kun afabla permeso de la redaktoro.

## Aŭdo kaj muzikeco

Multaj kaj variaj estas la fenomenoj en la mondo, kiujn ni perceptas kaj ekkonas per niaj kvin sentoj. Granda parto de ili estas objekto de nia aŭda organo. Per ĝi ni konatiĝas kun la sonoranta sfero de la realeco kaj difinas nian rilaton al ĝiaj objektoj kaj fenomenoj. Sen nia aŭdokapablo ne estus ebla la komunikigo inter la homoj parole kaj la tuta naturo dronus en absoluta silento.

Sampempe kun la fizika aŭdo, grandan signifon havas ankaŭ la muzika aŭdo. Nome per ĝia helpo la homaro ĝuas la plej ŝatatan arton, la muzikon, kio senpere esprimigas tion, kion la ordinaraj vortoj ne estas kapablaj esprimi — la homajn sentojn, pensojn kaj humorojn.

La muzikaŭdo estas kapablo de la homo percepti, ekmemori kaj reprodukti muzikaĵon, ankaŭ distingi la muzikajn sonojn laŭ alteco. Dank' al ĝi la homo povas kontroli la plenumadon kiam li mem, aŭ iu alia kantas aŭ ludas.

Ĉia muzika aktiveco — la scipovo aŭskulti, plenumi kaj verki muzikon — senescepte dependas de la evoluinta grado de la muzikaŭdo kaj ankaŭ de la muzikeco, kiu prezentas kapablon pri emocia perceptado al la muzikenhavo. La homa lerteco aŭskulti kaj ĝui muzikon estas ankaŭ arto, ĉar multaj aŭdas sed malmultaj aŭskultas emocie kaj povas kompreni la riĉan muzikan enhavon.

La sonoj en la muziko estas ordigitaj laŭ severa logika ordo, konforme al la arteca enhavo. Ĉiu muzikverko efektiviĝas en la tempo. Ĝi havas sian komencon, disvolvon kaj finon. La aŭskultanto devas atente postobservi ilin. Krom tio, ĉiu muzikverko havas difinitan formon respondan al la muzikenhavo.

Estas ankaŭ diversaj muzikaj esprimiloj kiel melodio, harmonio, metro-ritmo, tempo, dinamiko k.t.p. Ju pli bone oni komprenas la muzikajn leĝ-konformecon kaj emociiĝas des pli evoluintan muzikaŭdon kaj muzikecon oni havas. De siaflanko la penetrado en la muzikenhavo kaj la konsciado de la muzikaj esprimiloj helpas la disvolvon de la muzikaŭdo kaj la muzikeco. La baza indekso pri bona muzikeco estas ne nur la esto de la muzikaŭdo, sed ankaŭ la kapablo emocie percepti kaj travivi la muzikan enhavon. Ĉiu, kiu povas emociiĝi aŭskultante muzikon, posedas bonan muzikecon. Se iu havas bonan muzikaŭdon, facile distingas la sonojn laŭ alteco, povas eĉ nomi la sonojn, sed ne emociiĝas, ne povas senti la muzikan enhavon, ne eksentas estetikan ĝuon aŭskultante, li ne montras bonan muzikecon. La plenvolara muzikaŭskultado dependas ne nur de la evoluinta grado de la muzikaŭdo, sed ankaŭ de la akirita muzika sperto, de la konoj pri la leĝoj de la muzika arto, kaj de posedado de la muzika sento — la muzikeco.

La muzikaŭdon kaj la muzikecon posedas ĉiu homo en diversa grado. Ili ne estas denaskaj, sed produkto de historia homa evoluo dum kiu ili formiĝis kaj perfektigis. Iom post iom la organo de la fizika aŭdo akiris novajn kvalitojn de "muzika orelo", kapabla percepti kaj diferencigi la plej kompleksajn aŭdsentojn en la sfero de la muzikarto, verki muzikon kaj krei publikon, kapabla emociiĝi kaj kompreni ĝin. Denaskitaj estas nur la naturaj inklinoj, kiuj diferencas laŭ kvalito-gradon. Tio signifas, ke ne ĉiuj povas esti, ekzemple komponisto, dirigento, fama muzikisto; por tio necesas klare esprimitaj koncernaj inklinoj kaj konforma muzika preparado ligita kun obstina laboro. Sed ĉiu povas ĝui kaj kompreni laŭ sia muzikeco la muzikon.

La muzika psikologio pritraktas la problemojn pri muzika aŭdo kaj muzikeco kiel homaj kapabloj, kiuj evoluas laŭ la procezo de la muzikedukado kaj instruado.

La gepatroj, la instruistoj kaj la tuta socio estas vigle priinterestigaj de la muzika edukado de la junularo, ĉar de tiu dependas ĝenerale la florado de la muzika kulturo. La infana kaj lerneja aĝo estas la plej konvena periodo, kiu ne devas esti preterlasita. La familio, la infana ĝardeno kaj la lernejo aparte kaj komune povas multe kontribui pri la muzikestetika edukado de la kreskanta generacio. Ili devas efike helpi la disvolvon de muzika aŭdo kaj la muzikeco de la infanoj pere de esprimplena kantado, ludado kaj aŭskultado de plej bela muzikaĵoj.

La evoluo de la muzika aŭdo kaj la muzikeco de nia junularo ne estas memcela tasko. Ĝi kondukas al efika edukado de arteca gusto, kiu estas forta kriterio por distingi la belegan, realecan muzikon de la dekadenca, formalista muziko.

La morgaŭaj konstruantoj de la vivo devas scipovi, aŭskulti kaj kompreni la muzikajn verkojn, ĝui ilian belecon kaj reverki ties belecon en la vivo mem.

Nur tiam la muziko povos plenumi sian gravan socian funkcion kiel potenca estetika rimedo, nobligi la korojn, altigi la mensojn kaj fortikigi la volon de la homoj.



# Skribarto

Komuniki kun la aliaj homoj, ĉu de ĉiam ne estas unu el la zorgoj de la homo? En nia moderna mondo, malgraŭ televido, radio, magnetofono, la skribo restas la plej uzata komunikilo. Kial do ĝi ne estas la celo de la konstanta zorgo de la edukistoj? Eble kulpas la oficialaj instrukcioj, kiuj, konsiderante la skribon nur kiel ilon, limigis la esploron al la teknika kampo. La plej multo de la instruistoj rigardas tiun problemon solvita. Kaj tamen ...

“La skribo estas esprimrimedo; kiel la lingvo, la gesto, la irmaniero, ĝi karakterizas individuon kaj dependas de faktoroj, kiuj estas propraj al ĝi: korpa kaj mensa kreskado; morfologio; amkapablo; emoj . . .” (Dottrens)

“En la skribo, same kiel en la libera desegnado, liberigas la profundaj emoj de la personeco, tiel ke estas necese ĝin konsideri kun multe da respekto kaj prizorgo”. (Albert du Jalou)

Novaj problemoj ekestas:

– La skribo spegulante la karakteron, ĉu oni lasu la infanon skribi, kiel ĝi volas?

– Se ne, kiajn celojn ni devas fiksi al ni? Kiel ni devas interveni? Ĉu oni lasu la infanon skribi, kiel ĝi volas?

Legebla skribo necesas por la infano, ĉefe en niaj klasoj, kie la korespondado okupas tiel larĝan lokon. Por ke leteroj kaj albumoj estu akcepteblaj, necesas, ke la infano atingu plenan regadon de sia ilo. Kiajn celojn ni devas fiksi al ni?

“La lernejo devas instrui belan kaj ne rapidan skribon”. (Dottrens)

“Oni strebos en ĉiuj ekzercoj al korekta, legebla, pura skribo . . . Oni klopodos atingi, se eble, elegantan kaj agrablan prezentadon”. (Oficialaj instrukcioj de 1938 por klasoj de 13-jaruloj). Kion signifas korekta skribo?

– ĉu estas skribo laŭ la reguloj?

– skribo kun dikaĵoj (skribo kun dikaj kaj maldikaj strekoj)?

– skribo per presliteroj aŭ kunligitaj literoj?

– skribo oblikva aŭ vertikala?

Kion faru la instruisto antaŭ tiu diverseco? Li estos devigata elekti siajn regulojn, siajn majusklojn, la formon de sia skribo. Antaŭa konsento necesas inter ĉiuj instruistoj de la sama lernejo. Ĉu trudi la saman skribon al ĉiuj infanoj?

“Kaligrafia skribo, kiu ekzakte reproduktas modelon estus malkvietiga signo post la 9-a aŭ 10-a vivojaro. Ĝi montrus, ke la personeco de la infano ne povas esprimiĝi”. (Albert du Jalou)

Trudi la saman skribon al ĉiuj estas neebla kaj malbona. La skribo tre rapide personiĝas en niaj klasoj; la libera esprimado, konsciigante la infanon pri si mem, certe estas la ĉefa kaŭzo. Necesas tamen elekti; ĉar moderna simpligita skribo ankoraŭ ne estas proponita al ni, kion ni elektu, ĉu kunligita, ĉu preslitera skribo? Kiun ilon ni akceptu?

– la plumingon kun pinta plumo?

– la plumingon kun ronda plumo?

– la globetkrajonon?

La oficialaj instrukcioj rekomendas, en la unua klaso, la skribon per kunligitaj minuskloj, kiun oni kutime faras per plumingo kun pinta plumo. Multaj instruistoj, ho ve! obeas sen pripenso. Ĉu ili ne lernis per tiuj iloj? Sed ĉu ili ankoraŭ uzas ilin? Ĉu la ruĝa globetkrajono ofte ne anstataŭas kaj plumingon por modeloj kaj rimarkoj?

Dottrens, kiu spertis la presliteran skribon, opinias, ke “la lernado por 5, 6 aŭ 7-jaruloj, de la 26 signoj de la skribo, majuskloj kaj minuskloj, al

kiuj necesas aldoni la 52 presliterojn, estas psikologia neeblaĵo, la perceptado de la formoj en tiu aĝo ne ebligante la necesajn distingojn. Estas necese simpligi la desegnon de la literoj. Skribo de plenkreskulo pruvas, ke

– ni kunligas la literojn ĉiufoje kiam la ligsigno plifaciligas la desegnon de la vorto;

– tuj kiam la ligado postulas komplikan movon, ni levas la plumon kaj daŭrigas iom pli malproksime . . .

Nur 10 ĝis 15% nature emas ligi”.

Kaj la elekto de la ilo?

Plumingo aŭ globetkrajono?

Enketo farita (en 1964) ĉe trideko da homoj el diversaj medioj montris, ke 80% uzis la globetkrajonon. Kial ne akcepti ĝin en la lernejo? Kion oni riproĉas al ĝi?

– ĝi ofte estas malpura

– la foresto de ĉia penado instigas skribi rapide sed tre malbone.

Sed la problemo restas ne solvita, ĉar post la lerneja tempo, la infanoj skribos per la globetkrajono: kaj forĝante oni iĝas forĝisto.

Kiujn gvidliniojn sekvi?

– ne trudi al ĉiuj infanoj la saman skribon;

– tamen ne lasi ilin skribi, kiel ili volas;

– helpi ilin havigi al si belan skribon.

Kio estas bela skribo?

Fakte temas pri legebla skribo kaj puraj kajeroj. Tion oni povas akiri rapide per malgrandaj sed oftaj venkoj.

Kiel doni al la infano la bezonon bele skribi?

– per la korespondado

– per la kooperata etoso de la klaso.

Kion povas alporti la korespondado?

La kritikoj de la korespondanto ĉiam efikas. Kion oni ne faru por plesurigi lin? La skribo influas la karakteron same kiel la kraktero influas la skribon. Kiam la volo progresi eniris la infanon, ĉiu proponita helpo estas akceptita de li kun plezuro. La instruado povas esti individua aŭ kolektiva. La perfektigo estas individua afero inter la infano kaj la edukisto. Ĉi lasta “soifigu”.

Kiel korekti perturbatajn skribojn?

La problemo por la edukisto estas trovi la kaŭzon, kiu perturbas la karakteron kaj sintenon de la infano. Povas esti kora konflikto aŭ nova perturbo. Ne trudi sed krei interhelpan, ĝojan etoson. Helpe de la libera esprimo, eble ni sanigos niajn nestabilulojn kaj nervemulojn.

Artikolo de Jean LE GAL  
aperinta en “Dossier pédagogique  
de l’Ecole Moderne”  
tradukita de Jeannine Vincent  
kun permeso de la aŭtoro.

# Pri la instruado de la gepatra lingvo

de Jeannine Vincent, Francujo.

Kiam la infanoj atingas la aĝon de la deviga lerneja vizito, kion ili scias lingve? Tiu scio estas tre diversa laŭ la infanoj mem, sed ĉefe laŭ la familia kaj socia medio. Kompreneble, infano de akvokato aŭ de inĝeniero havas multe pli riĉan vortrezoron ol tiu de simpla laboristo kaj tiu diverseco povas naski gravajn malfacilaĵojn sur la instrua kampo.

Kiel alporti rimedon al tiu situacio? Plej ofte nun, la infanoj jam vizitas lernejon aŭ infanĝardenon, antaŭ ol atingi la aĝon de la deviga instruado. En tiuj domoj, ili povas libere paroli kun la prizorgantinoj kaj jam akiri sufiĉan lingvoscion por esprimi la plej simplajn pensojn kaj bezonojn. Tio ja estas nur daŭrigado de la natura lernado pere de la familianoj. Ĉu tiu natura metodo plue estos uzata en la elementa lernejo? Ĉu ĝi sufiĉos por doni al la infanoj la rimedon por esprimi sin pli precize, pli komplete? Kelkaj pedagogoj opinias, ke jam ekde la unua klaso, estas necese sisteme instrui al la infanoj vortlistojn pri iu difinita temo. Ekz: la unuan semajnon, oni konversacias pri la nova lernejo, la duan semajnon pri la vinberrikolto k.t.p., supozante, ke tiu temo, elektita de la instruisto, nepre interesos la lernantojn, ĝuste en tiu semajno. Aliaj pedagogoj observis la infanajn reagojn kaj konstatis, ke tio, kio interesas unu, lasas la najbaron tute indiferenta kaj venis al la konkludo, ke ankaŭ en la elementa lernejo, estas necese lasi al la infanoj plenan liberecon sin esprimi. Tiel naskiĝis la "libera teksto", verkita de la infano, kiam li havas ion interesan por rakonti. Li alportas sian tekston al la lernejo, legas ĝin antaŭ la tuta klaso. Kun la helpo de la instruisto, li klopodas forigi la erarojn, la nekorektaĵojn, trovi pli ĝustan esprimon, plibeligi sian stilon. Krome, se li havas la eblecon interŝangi siajn tekstojn kun lernanto de alia klaso, tiam li povas kompari kaj estas alte stimulita en sia lernado. Tre rapide lia lingvoscio progresas, indiferente ĉu li estas filo de ĝardenisto aŭ de kuracisto, kaj tio ja estas bona rezulto.

S-ino J. Vincent, Francujo.

## Sperto en sonbenda lingvo-lernado

Ekzistas bonaj kursoj, kiuj utiligas diskojn kiel prononcadan modelon kaj por aŭdigi la lernendajn tekstojn. Certe tio estas bonega ideo — tute ne nova laŭprincipe, — ĉar ne nur por la artikulado sed ankaŭ por la tutaĵo de lernenda lingvo aŭdado efikas. Sed la aŭdigo fare de diskoj estas limigita:

- + disko ne eblas kontrolon de la propra prononco kaj
- + la relative malmultaj tekstoj nur pritraktas malmultajn kampojn aŭ aferojn.

Ĉi tiu bedaŭrinda fakto — kies mencio tute ne estu riproĉo je ia diska kurso — en rilato al *propraj* spertoj kaj tiuj, kiujn aliaj estas farintaj (eĉ en universitataj kaj similaj institutoj) jam antaŭ multaj jaroj, sugestis min pri pensi plifaciligon de lingva studado.

Unua tre frua sperto sur tiu kampo estis jena: Mia frato kiel lernanto devis parkerigi poemon, kio estis malagrable kaj malfacila agado pro la senrimeco de la teksto. — Mi mem — du jarojn pli juna — kuŝis ie komferte kaj komplete malstreĉe, kaj mia tuta agado nur estis aŭdi kaj ne atente aŭskulti. Malrapid-paŝe mia frato tramigris la ĉambron dum siaj perovoĉaj lern-

klopodoj. Do post mallonga tempo suflore mi kapablis helpi lin. — Kaj tiam, post du jaroj, mi devis lerni la saman poemon: sed tio ne necesis, ĉar mi ĝin ankoraŭ sciis. Mi tute ne asertas esti pli inteligenta ol mia frato, sed laŭ la cirkonstancoj mi ne streĉis mian menson, t.e. mi estis "malfermita" por subkonscia "enfunelado". Tiamaniere eĉ dormante eblas lerni, kiel pruvis eksperimentoj universitataj.

Sekvis aliaj spertoj parte alikampaj: Sed la rezultoj ĉiam estis la samaj; *ju pli malstreĉe iu troviĝas, des pli facila estis la lernado.* — Ĉiuj, kiuj posedas magnetofonon, havas bonan ŝancon daŭrigi aŭd-vidan vojon ankaŭ post la kurso per iuj bonstilaj tekstoj el postkursnivelaĵoj aŭ revuoj. Do eĉ dum la diska kurso estas rekomendinde utiligi sonbendon kiel kontrolilon: simple komparu viajn proprajn parolaĵojn kun la diskaj. Kaj finfine vi havos du aŭdeblajn kursojn, diskan kaj sonbendan, proprevoĉan. — Vi ankaŭ povas aŭdigi nur presitan lernolibron kaj tiel estigi aŭdigan kurson.

Sed estu paciencema, ĉar via propra voĉo ege trompas vin; ĝia sono, kiun vi kutime aŭdas, ne samas al tiu, kiu estas aŭdebla por aliaj. — (Tial multaj ne ekkonas la propran voĉon je sonbenda reludo.) — Tio estas la kaŭzo por tio, ke *nura ripeto* de la diskaj frazoj ne estas fidinda kaj taŭga kontrolo pri la propra prononco. Alivorte, sonbenda kontrolo estas kvazaŭ deviga kompletigo de diska kurso, ĉar tiu kombinita laborstilo kvazaŭ samas lingvolaborejon.

Jen alia kaŭzo por necesa paciencemo: Mikrofono estas demona objekto; kvankam sendanĝera (ĉar ĝi ne mordas!), tamen almenaŭ dum la unua tempo estas ekscitante surbendigi permikrofona. Mi ne scias ian kialon, ĉar ja eblas ripeti respektivan parton, se iu misparolaĵo okazos. Sed per sia malsubaĉet-ebleco la demona objekto, kies nomo estas mikrofono, montras al vi kaj al ĉiu alia aŭdanto ĉiun malklarecon de la propra artikulado — ankaŭ rilate la gepatran lingvon. Ne ĉagrenu, se necesus ripeti frazon tri- aŭ eĉ kvar-foje. Sed nepre estas rekomendinde estingi erarplenajn frazojn *tuj*, por ne subkonscie absorbi malkorektaĵojn.

La sonbenda *parolaĵo* nur estas la unua parto de la sonbenda agado. La alia — kaj pro ĉi tio ne toleru kiun ajn eraron en la sonbenda teksto — estas la aŭdigo resp-e aŭskultado. Aŭdu ĉiutage ĉirkaŭ duonan horon, kaj kelkfoje aŭskultu atente, plej eble samtempe kunlegante tekston. Por ebligi tiun sukcesplenan vojon estas rekomendinde legi la tekstojn surbende ne laŭ libro aŭ gazeto, sed utiligu pro tio bone tralaboritan manuskripton, precipe, se vi ofte ŝanĝas tekstfonton. Novajn vortojn enŝovu de tempo al tempo, avantaĝe post ia alineo. — Daŭrigu la surbendajn parolaĵojn ĝis la tuta bendo estas plena. Tiam vi verŝajne ne plu bezonas la plej malnovajn frazojn resp-e tekstajn ĉapitrojn; reuzu vian bendon por novaj lingvaĵoj samtempe forigante la plej malnovajn.

La rezulto de tia sonbenda agado estas multflanka:

- + Komence vi havas kontrolon, ĉu vi parolas laŭ la internacia modelo;
- + post diska kurso avantaĝe vi eblas daŭrigi la studadon samvoje helpe de aŭdebla modelo;
- + subkonscie vi akiras plimulte da lingva kapablo ol eblas per konscia streĉo, kio ne volas diri, ke vi ne ĉiun aferon nepre devas kompreni komplete kaj intelekte antaŭ ĝia surbendiĝo.

Post kelkaj — malmultaj — semajnoj aŭ eĉ tagoj vi konstatos jenon: Se vi volas uzi parolturnon, ĵus kiam vi pensas al la koncerna nocio, rememore interne vi aŭdas — kvazaŭ kiel parolon de ia lingva konscienco — ekzemple "iĝ-neniam uzu kune kun ita-formo!" aŭ "ĝis, al kaj tra jam — per si mem — esprimas direktojn, kaj neniam ilin utiligu kune kun n-formo!". Se vi surbendigas nur-presitan lernolibran tekston kaj ĝin aŭdis nur kvinfoje eĉ subkonscie dum viaj matenaj agadoj kiel lavado, vestado k.s. aŭ dum aliaj sam-specaj okazoj, la lingvaj ekzemploj tiel profunde estas enigita en la subkonscio, ke vi aŭtomate reagas laŭ la ĝusta vojo por eviti erarojn.

Kimie kaj Raif Markarian, kiuj venis kiel gastoj de la Esperanto-sekcio de la "Movado-Freinet".

Japandevena s-ino Markarian demonstraciis la Sorobanon, japanan kalkulon, en fakkunveno de la matematikistoj; s-ro Markarian, angla lernejestro, prelegis pri la vivo de la brita eduka pioniro, A. S. Neill, kies ideoj multilate similis al tiuj de Freinet.

Ges-roj Markarian deĵoris ĉe la konstanta Esperanto-ekspozicio, aranĝita de s-ro L. Lentaigne (Montpellier) kaj E. Plutniak (Liévin) kaj liaj kunlaborantoj de la Esperanto-sekcio.

Ne-Esperantistaj konferencanoj ofte aŭdis Esperanton kaj povis konstati ĝian praktikan valoron en internacia kongreso.

Raif Markarian.

## 17-a Eŭropa Semajno en Hannut (Belgio)

Profesoro Van Horebeek malfermis la 17-an eŭropan semajnon.

Amikaj rilatoj rekte estiĝis inter la partoprenantoj, kiuj havis la honoron esti akceptitaj de la urbestro de Hannut.

Antaŭ la 40 ĉeestantoj el 6 diversaj nacioj s-ro Govaers ĝenerala sekretario de "Civisme Européen" prelegis klare, precize kaj objekte pri la rimedoj por divstigi la ideon pri eŭropa civitismo.

Civitismo ĉefe estas sinteno, komprenemo pri la nuntempaj problemoj, sed ankaŭ ago, konscia sindonemo. Civitismo estas samtempe loka, regiona, nacia kaj monda. Oni povas nek kontraŭigi tiujn diversajn aspektojn, nek disigi ilin. Civitano, laŭ la ĝusta signifo de tiu-ĉi vorto, estas samtempe zorgema pri sia loka aŭ regiona komunumo kaj pri la mondaj problemoj.

Kial do "eŭropa civitismo"? – Al problemoj unuflanke regionaj kaj aliflanke mondaj nia respondo – de ni, kiuj loĝas en Eŭropo – povas esti nur eŭropa.

Nia socio devas sin turni al defioj nome: la anonima karaktero de la publika administrado, la problemoj kaŭzita de industria socio kaj de maljusteco en la mondo. Por respondi tiujn defiojn, niaj ŝtatoj estas kaj tro grandaj kaj tro malgrandaj: tro grandaj por ebligi partoprenon de la civitanoj, tro malgrandaj por efike alfronti la problemojn de la industria socio. Niaj ŝtatoj estas malhelpaĵoj tiel por malcentrigo (regionaligo), kiel por supernacieco (kunlaborado, kontinentaniĝo kaj mondaniĝo).

Civita edukado estas do tute alia afero ol kurso pri institucioj aŭ propagando favore al nun ekzistantaj eŭropaj institucioj. Ĝi estas unue konsciigo pri la ĝusta graveco de la problemoj por akiri supernacian sintenon. Nur tiam efikaj solvoj estos trovitaj kaj efektivigitaj cele al konstruo de nova socio.

Pluraj el la partoprenantoj scipovis Esperanton, tiun internacian lingvon, kiu estas praktika rimedo por interŝanĝo de ideoj kaj opinioj inter la diversaj laborgrupoj.

Por ripozigi la mensojn ekskurso al urbo Liège gvidita de F. Leclerc sekretario de la E.S. donis al la fremduloj okazon por malkovri la ĉefajn kuriozaĵojn de la urbo, kaj por viziti la mirinde belan bibliotekon de la provinco. Vespermanĝo laŭ tipa Liège-maniero finigis tiun malstreĉigan posttagmezon. Fine vespermanĝo vesperfestoj kun partopreno de danc-grupo "Danshan" direktita de gesinjoroj Lamproye markis la finon de 17-a eŭropa semajno. Sed antaŭe ellaboriĝis konkretaj decidoj: nome: fondiĝo de eŭropa sekretariejo, Grehen-Strato 1, Hannut, kies respondeculo estas R. Bussé. Tiu oficejo centraligos la eksperimentojn provotajn en la diversaj eŭropaj landoj, kie deĵoras respondeculoj. Informado kaj organizo de eksperimentoj estos prizorgitaj en Neder-

lando de O. Hoekstra kaj A-M. Peeraer en Germanio de H. Blumenkamp kaj K. Ruff, en Franclingva Belgio de s-ino Melont kaj P. Humblet, en flandra-lingva parto de G. Pirlot, en Francio de f-ino R. Triolle kaj G. Turin, en Britujo de M.A.C. Edwards.

R. Bussé.

## Prepare al plano por Eŭropa Edukado

Raporto de Raif Markarian, Sekretario de la Brita Asocio de Esperanto-Instruistoj

8-a ĝis 10-a de novembro, 1974, Konferenco de la Eŭropa Asocio de Instruistoj (EAI) en la Universitato de Bristol, Britujo.

Ĉeestis oficistoj (i.a. s-ro Hywell Jones) el la Eduka Fako de la Eŭropa Komisiono en Bruselo, la Prezidanto de la EAI, s-ro André Alers, kaj la Direktoro de la Informa Centro por Eŭropa Edukado, s-ro Michel F.J. Govaers.

Inter aliaj temoj estis pritraktita la lingvo-problemo en la EAI kaj en la Eŭropa Komunumo. Parolis du esperantistaj ĉeestantoj, lernejestroj Grahame Leon-Smith kaj Raif Markarian, ambaŭ el Londono. Ili provizis por la informtablo ekzemplerojn de 1) la 1956-a Raporto al la Eŭropa Konsilantaro de s-ino Rehling pri la Instruado de Esperanto; 2) la Esperanto-eldono de la eldonado de la Informcentro de s-ro Govaers, "Eŭropa Dokumentaro", kiu aperas ankaŭ sub la aŭspicioj de la EAI; 3) broŝuroj pri la Brita Asocio de Esperanto-Instruistoj kaj pri ILEI.

El la 50 ĉeestantoj el kvar landoj multaj informiĝis pri Esperanto.

Unu el la finaj rezolucioj estis, ke EAI kaj la Eŭropa Komisiono starigu studgrupojn por detale studi la diversajn eventualajn solvojn de la lingvo-problemo, inkluzive Esperanton.

R.H.M.M.

## Pedagogia enketo

Al geinstruistoj de la tuta mondo.

Mi estas pola instruisto, 39jaraĝa, kaj mi interesiĝas pri problemoj de la lerneja pritaksado de la scioj de la gelernantoj. Aktuale mi laboras en la Instituto pri la Edukado de Instruistoj kaj Klerigaj Esploroj en Katowice (Pollando).

Helpe de nia internacia lingvo, mi volus atingi kiel eble plej grandan gekolegaron laborantan en diversaj gradoj de la instruado, en diversaj lernejoj sistemoj en la tuta mondo. Por mia scienca laboro estas urĝe necesaj sciigoj pri tio, kiel geinstruistoj en la ĉiutaga laboro solvas la edukajn problemojn ligitajn kun la pritaksado de la scioj de la gelernantoj, en diversaj lernobjektoj. Ĉi-sube mi donas kelke da demandoj, kiuj – mi esperas – helpas al bonvenuloj en la prilaboro de la priskribo.

Mi anticipe dankas pro ĉiu ricevita sciigo, ankaŭ parta. Mian dankemon al la E-movado pro la helpo en la kolektado de la materialoj mi intencas kompensi per la publikigo de la rezultoj de ĉi tiu enketo en Esperanto kaj pola, rusa kaj germana lingvoj. Mi opinias, ke tiamaniere mi donos ankaŭ argumenton pri la utiliteco de Esperanto en la sfero de internaciaj pedagogiaj esploroj.

Al gekolegoj, kiuj resendos siajn respondojn kaj aldonas sian legeblan kaj

precizan adreson mi aparte dankos per memorbildkarto el Katowice.

Mia adreso: Kazimierz Gorzelok  
ul. Gottwalda 6 g m. 24  
40-115 Katowice 12  
Pollando.

#### Enketaj demandoj.

1. Ĉu vi, sinjor(in)o, uzas iun skalon por la pritaksado de la gelernantoj en via instruobjekto? Se jes, bonvolu priskribi nomojn de la notoj de la skalo (ankaŭ en la nacia lingvo), ilian eventualan nombran (simbolan) enskribon, kaj konsekvencojn, kiuj rezultas por gelernantoj, kiam ili ricevos difinan noton. Se vi uzas neniun skalon de la notoj, bonvolu mallonge priskribi, kiamaniere vi pritaksas viajn gelernantojn.

2. Bonvolu nomi, kio estas kutime objekto de la pritaksado, kiujn vi atribuas dum la lecionoj de via instruobjekto?

3. Kiucele vi pritaksas la gelernantojn ankaŭ de via instruobjekto?

4. Ĉu en la pritaksado partoprenas ankaŭ la gelernantoj? Se jes, bonvolu priskribi kiamaniere.

5. Kion oni devas fari, laŭ via opinio, por ke la pritaksado de la instruobjekto estu pli bona instrumento de la edukado?

6. Ĉu vi dum via pedagogia praktiko trovis iun interesan publikaĵon pri la lerneja pritaksado? Se jes, bonvolu nomi ĝin, ankaŭ en la nacia lingvo (temas pri aŭtoro, titolo, eldonejo kaj eldonjaro).

7. Aliaj diversaj rimarkoj pri la edukado funkcio de la lerneja pritaksado.

Indikoj pri la respondado:

1. Lando . . . . .
2. Loko . . . . .
3. Plena nomo de la lernejo . . . . .
4. Instruobjekto(j) . . . . .
5. Instruiteco . . . . .
6. Kiom da jaroj vi laboras kiel pedagogo? . . . . .
7. Aĝo . . . . .
8. Sekso . . . . .
9. Eventuala korespond-adreso . . . . .
10. Dato . . . . .

## Scienca Esplor-Instituto de ILEI (SEI)

§1 La Scienca Esplor-Instituto (SEI) estas konstanta faka institucio de ILEI, fake apartenanta ĉiam al Universitato, en kiu funkcias oficiala fako aŭ katedro pri Esperanto, rajtigita doni oficialan ŝtatan pedagogian diplomon. (1)

§2 La celo de SEI estas:

a) lingvokultura- sekvi la lingvoevoludon kaj kontribui al ĝi: liveri altnivelan, modernan esplormaterialon, taŭgan por la scienca priskribo kaj analizo de la lingvo, prizorgi la antaŭpreparon de novaj esperantologioj- esploristoj.

- b) literatura- retaksi kaj analizi la ekzistantan E-o literaturon laŭ la postuloj de nuna tempo, selekti la literaturan materialon laŭ ĝia enhava kaj forma valoro, cele de la supera instruado.
- c) instru-eduka- konstrui ekzaktan instru-modelon de la lingvo, ĝiajn bazajn dokumentojn kaj programojn, cele de ĝia diversnivela instruado (de la elementa ĝis la universitata), kontroli kaj analizi la ekzistantajn instruhelpilojn kaj konstrui novajn, pli modernajn, fake gvidi la PDE-ojn, analizi la testojn kaj liveri al KOK-oj (2), (3), science dokumentitan fakmaterialon, prizorgi la antaŭpreparon de diversnivela E-o fak-instruistoj, E-o fakinstruistaro, organizi kaj gvidi la IPE-ojn (Internacia Pedagogia Ekzameno).
- d) historia- science studi la historion de E-o lingvo, literaturo kaj movado, objekte analizi ĝin en ĝia evoluado, sociaj interrilatoj kaj perspektivoj.
- e) interlingvistika- kiel help-studo al Esperantologiaj esploroj SEI devas esti en konstanta rilato kun ĉiuj okazintaĵoj, koncernantaj la planlingvan problemaron por ĝustatempe liveri bezonatajn dokumentojn, SEI, ellaboras novan, science bazitan interlingvistikan koncepton kaj aldonas taŭgan materialon per ĝia supera instruado.

#### §3 *Agadmetodo*

- a) En la celo de unueca lingvouzo en ĉiunivelaj kursoj SEI fiksas tiujn lingvajn normojn, kiuj en la nuna lingvo-evolua stato ankoraŭ ne estas registritaj. Tiucele la membroj de SEI faras "proponojn". Ĉiu regula membro de SEI studas la proponojn kaj balotas. Li rajtas akcepti, modifi aŭ forĵeti la proponon. La propono estas akceptita tiam, se la 3/4 de la balotintoj akceptis ĝian finan formon. La akceptita propono fariĝas deviga por ĉiuj instru-edukaj institucioj, apartenantaj al ILEI.
- b) SEI aktivas surbaze de 10-jara perspektiva kaj 2-jara operacia planoj. (4) La membroj de SEI elektas el la plano la konvenan por ili temon kaj esploras ĝin individue. La esplormaterialo de SEI estos publikita en la sekvaj periodaĵoj: "ACTA ESPERANTOLOGIA" (5) – aperos ĉiun duan jaron. "Internacia Pedagogia Revuo" (IPR) – enhavos ĉiunumere apartan rubrikon por SEI-informaĵoj.
- c) Al la konstanta SEI – materialo apartenas: la seminarioj, kursaj kaj diplomlaboraĵoj de E-o fakaj studentoj perspektive diplomitoj de IPE, la universitataj fakaj lernolibroj, la analizaj detal-studoj kaj la fina analizo de PDE-oj, ĉiuj monografioj, koncernantaj la temojn de la §3 (a-e).
- d) La instru-edukaj celadoj de SEI efektiviĝas en la oficiala ŝtata instruado, en la someraj kaj feriaj liberaj universitatoj, en la konstantaj programitaj perkorespondaj pedagogiaj kursoj, se ili aliĝas al SEI kaj petas ĝian fakan konsilon. En tiuj rilatoj SEI estas nur konsulta kaj fakkonsilanta organo.
- e) Por pridiskuti la plej aktualajn kaj plej gravajn sciencajn problemojn SEI aranĝas ĉiun duan jaron simpoziojn. La materialo de la

§4 *La konsisto de SEI*

SEI havas regulajn kaj korespondajn membrojn. Kaj la korespondaj membroj de SEI rajtas partopreni la esploran laboron de la Instituto, sed balotrajton havas nur la regulaj membroj.

- a) Regula membro de SEI povas esti tiu membro de ILEI, kiu:
  1. havas universitatan diplomon,
  2. estas profesoro, magistro aŭ universitata respektive atlerneja docento, asistento, lekciisto aŭ lektoro,
  3. estas diplomito de IPE, respektive dipl. S.E.I.*Rim.:* La kondiĉoj 2. kaj 3. estas alternativaj. Regula membro de SEI povas esti, kiu respondas al la kondiĉoj 1. kaj 2., respektive 1. kaj 3.
- b) Ĉiu regula membro de SEI estas samtempe membro de konstanta IPE-komitato.
- c) Koresponda membro de SEI povas esti ĉiu membro de ILEI, kiu
  1. havas pedagogan diplomon sekve estas instruisto, bazlerneja fak-instruisto,
- d) La nombro de SEI-membroj ne estas limigita.
- e) Tiu membro de ILEI, kiu respondas al la supraj kondiĉoj kaj intencas aniĝi en SEI prezentas sin perletere al la Direktoro de SEI, aldonante la fotokopiojn de tiuj dokumentoj, kiuj pravas, ke la kandidato respondas al la postulataj kondiĉoj.

§5 *La gvidado de SEI*

- a) La estraro de SEI konsistas el 4 membroj:

la direktoro, du vicdirektoroj kaj la sekretario; la estraro de SEI decidas pri la laborprogramo de la instituto, pri la akcepto de novaj membroj kaj redaktas la materialon de SEI por la periodaĵoj.
- b) La direktoro de SEI estas la ĉiama fak - aŭ katedro-gvidanto de Esperanto en tiu universitato, kie estas la centro de SEI.
- c) La vicdirektorojn kaj la sekretarion nomumas la estraro de ILEI laŭ propono de la direktoro de SEI.
- d) La estraro de SEI estas samtempe ankaŭ la estraro de konstanta komitato de IPE.

§6 *Aliĝo al SEI*

- a) Ĉiu instru-eduka instanco, kie E - o estas instruata kaj havas rilaton al ILEI, rajtas uzi la servojn de SEI kaj rajtas partopreni ĝian laboron.
- b) Se iu alia organizaĵo aŭ institucio volas aliĝi al SEI aŭ intencas havi la servojn de SEI, ĝi devas peti la aŭspicion de ILEI. Se la estraro de ILEI akceptas la peton, la aŭspiciita organizaĵo, institucio aŭ kurso aŭtomate aliĝas al SEI.

§7 *Financoj de SEI*

Ili estas integritaj en la financon planon de ILEI.

§8 *Supera organo de SEI estas la asembleo de ILEI.*

- 1) La nuna centro de SEI estas la fako Esperanto lingvo kaj literaturo de la universitato Eötvös Lorand, Budapeŝt V., Pesti Barnabas u. 1-3. Se ĉesus la fako en la universitato, la novan centron elektos la estraro de ILEI laŭ la propono de la direktoro de SEI, konsiderante la kondiĉojn de la §1.
- 2) PDE = Pedagogia – Didaktika Eksperimento.
- 3) KOK = Konstanta Organiza Komitato.
- 4) La laborplano de SEI estas oficiale enkadrita en la sciencesplora programo de la katedro de ĝenerala kaj aplikita lingvistiko en la filozofia fakultato de la universitato Eötvös Lorand, Budapeŝt.
- 5) La unua numero aperos en 1975.

## RIDEF 76 en Pollando

La Internacia Renkontiĝo de Freinet-Edukistoj okazos en Pollando dum la unua duono de aŭgusto 1976, en Varsovio aŭ apude.

En antaŭaj renkontiĝoj, partoprenintoj jam uzis Esperanto dum parto de la aktivaĵoj, sed en Pollando, se la Esperantistoj volas, Esperanto povos esti kvazaŭ la oficiala lingvo: tio havus grandan ehon en la Freinet-movado kaj en la FIMEM (Internacia Federacio de la Freinet-Movado).

Dum tiu RIDEF la partoprenontoj povos:

- 1) konatiĝi intime kun Pollando dank' al la helpo kaj la gvidado de polaj kolegoj esperantistaj,
- 2) travivi la Freinet-pedagogion kiel plenkreskuloj, uzante ĝiajn fundamentajn teknikojn: tio estus la plej bona iniciado!
- 3) uzi praktike kaj larĝskale Esperanton.

Do, jen unika okazo! Ni profitu ĝin por nia propra bono kaj por montri konkretan realigadon al la skeptikuloj.

Niaj samideanoj Jean kaj Louise MARIN ricevis la pezan taskon organizi tiun renkontiĝon. Ili esperas gravan partoprenon de kolegoj kaj ili deziras scii, kiel eble plej rapide, la nomojn de la eventualaj partoprenontoj. Informu kolegojn interesigantajn pri Esperanto.

Petu de via sindikato ke ĝi aperigu la informon.

Slipo resendota al Jean MARIN, 9 Rue Adrien Lejeune, F-93170 BAGNOLET  
Tél. 287 64 45  
(kiel eble plej frue, antaŭ la 20-a de junio se eblas)

S-ro, S-ino, F-ino ..... Antaŭnomo .....

Kompleta Adreso .....

telefonnumero: .....

Nivelo de la esperanto-kono: bona, meza, elementa

Mi deziras partopreni en la RIDEF 1976 en Pollando,  
mi estos akompanata de .....

*Rimarkoj:*

Dato kaj subskribo:

# Internacia Ligo De Esperanto-Instruistoj

## Estraro de la Ligo

- 1) Prezidanto: Rektoro Helmut Sonnabend, Im Eckerkampsfeld 11a, D-3161 Dollbergen (Fed. Resp. Germanujo)
- 2) Vicprezidanto: Direktoro Johano Ingusz, Liget út. 40, H-1102 Budapest X, (Hungarujo)
- 3) Sekretario: D-ro Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C., (Italujo)
- 4) Vicsekretario: S-ro Gaston Turin, 43 Rue Emile Magnin, F-25300 Pontarlier (Francujo)
- 5) Kasisto: S-ro Olle Olssen, Bantorget 3, S-222 29 Lund (Svedujo)

## Sekciestroj de la Ligo

- Aŭstraliao: Ivan T.M. Maddern, Box 411, Morwell 3840, Victoria  
Aŭstrujo: Ernst Rixner, Kleingasse 6 -18/8/13, A-1030 Wien  
Belgujo: G. Pirlot, Torhoutsteenweg 17, B-8400 Oostende  
Britujo: Raif Markarian, 87 Sebastian Ave., Shenfield, Brentwood, Essex CM15 8PP  
Bulgarujo: Vasil Bozarov, ul. Ljubotran 98, blok 4, Vhod A, Sofia  
Danlando: Lis Thune, Brembävänget 15, DK-2650 Hvidovre  
Finnlando: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82  
Francujo: F. Le Magadure, 23 Rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont  
Germanujo: Hermann Behrmann, Bahnhofstr. 54, D-4972 Löhne 1  
Grekujo: Sokrates Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Ateno  
Hispanujo: Felipe Gonzales Del Pino, Dona Maria de Molina 15c, Sevilla  
Hungarujo: Marta Cser, Zelay út. 10-14, H-1368 Budapest V  
Israelo: Ron Aser, Raanana, Aser 5  
Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík  
Italujo: Catina Giulia Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa C.  
Japanujo: Gamon Higashi-cho 6-51, Koshigaya-shi 343  
Jugoslavio: Miodgrad Stojanovič, Duruntorska ul. 2/IV-32, YU-11000 Beograd  
Kanado: George Du Temple, 930 Ardmore Drive, R.R.2, Sydney, B.C.  
Kolombio: Manuel Angel M., Apartado Aéreo 50179, Medellin  
Nederlando: O. Hoekstra, Frederikslaan 47, Schoorl-1719  
Norvegujo: Elna Matland, Brekkeveien 50, N-4200 Sauda  
Nov-Zelando: F. Fleming, P.O. Box 5042, Wellington  
Pollando: Teresa Nemere, str. J. Olbrachta 3/5 m 12, PL-87-100 Toruń  
Rumanujo: Ignat Bociort, D-dul Eroilor nr. 7/D, et. 1, ap. 5, Timisoara  
Suda Koreujo: Dae Young-Rhie, 240-19, Sang-do-2-dong, Yong-dung-po Ku, Seoul  
Svedujo: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, S-421 74 Västra Frölunda  
Svislando: Kurt Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco  
Usono: John L. Lewine, West Stockbridge, Mass. 01266

## Kunlaborantaj organizoj aŭ izolitaj membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, pošta 5, Zdobov V-28, CS-261 05 Přebram  
Germanujo DDR: Ludwig Schödl, Rosa Luxemburgstrasse 37, DDR 195 Neuruppin  
Kubo: Pedro Pablo Lamas Díaz, Apartado 283, Ciego de Avila  
Sovet-Unio: Iohannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallin, Eostis NSV  
Zairo: Antoine-Samuel Ngangu, B.P. 13, Lukala (Nkandu)